

ĈIELENIRO DE JESUO, 28an de MAJO 2017

ESTAS DONITA AL MI ĈIA POTENCO EN LA ĈIELO KAJ SUR LA TERO

Fino de la evangelio laŭ Mateo 28, 16-20
Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

En tiu tempo la dek unu disĉiploj iris en Galileon, sur la monton, kiun Jesuo antaŭe indikis al ili. Kiam ili vidis Lin, ili adorkliniĝis, kelkaj tamen hezitis kredi. Jesuo alproksimiĝis kaj diris: „Estas donita al Mi ĉia potenco en la ĉielo kaj sur la tero. Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj, baptante ilin en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito, kaj instruu ilin observi ĉion, kion Mi ordonis al vi. Kaj sciu, ke Mi estos kun vi ĉiam, ĝis la fino de la mondo.“

La epizodon de la ĉieleniro de Jesuo ni trovas nur en la evangelio de Luko, kaj en la kroma finaĵo de la evangelio de Marko, sed ne en la ceteraj evangeliistoj, nek en Mateo, nek en Johano, sed la mesaĝo de la evangeliisto Luko estas tute sama kiel tiu de la aliaj: tiu de Jesuo ne estas disiĝo, sed apudeco, ne estas malproksimeco, sed ĉeesto eĉ pli intensa, ĉar Jesuo estas en la pleneco de la dia kondiĉo. La finaĵo de la evangelio de Mateo estas kvin versikloj, en kiuj la evangeliisto enfermas, resumas sian tutan evangelion.

"La dek unu disĉiploj", la disĉiploj ne plu estas dek du, kaj la nombro, en ĉi tiu evangelio, ne estas restarigita. Dek du signifis la novan Izraelon, dek unu signifas, ke la nova Izraelo ne estas restarigita, do la mesaĝo de Jesuo estas universala, ĝi estas por la tuta homaro. *"iris en Galileon"*, ili iras en Galileon ĉar ja trifoje estis pli frue la invito renkonti Jesuon en Galileo – Jesuo resurektinta, en ĉi tiu evangelio, neniam manifestiĝos en Jerusalemo.

Sed, diras la evangeliisto, *"sur la monton"*, utiligante la difinan artikolon, do temas pri iu aparta monto, *"kiun Jesuo antaŭe indikis al ili"*, sed Jesuo en ĉi tiu evangelio indikis neniun monton. Kial la disĉiploj iras sur "la" monton? La signifo ne estas topografia, sed teologia: la monto, en ĉi tiu evangelio, estas la monto de la feliĉproklamoj, kie Jesuo proklamis sian mesaĝon, feliĉoj kiuj estas ok, kaj la nombro ok estas la cifero de la resurekto en la prakristanismo, ĉar Jesuo resurektis la unuan tagon post la semajno. Do la disĉiploj klare iras sur "la" monton: la evangeliisto intencas diri, ke la sperto pri Jesuo resurektinta ne estas privilegio konsentita antaŭ dumil jaroj al malmultaj homoj, sed ebleco

por ĉiuj kredantoj de ĉiuj tempoj, sufiĉas loki sin sur "la" monton de la feliĉproklamoj, tio estas, akcepti la mesaĝon, kiu estis vortumita kaj resumita en la feliĉproklamoj.

"*Kiam ili vidis Lin,*", la verbo vidi utiligita de la evangeliisto ne indikas la korpan vidon, sed profundan internan sperton, "*ili adorkliniĝis,*", do ili rekonas en Jesuo iun dian kondiĉon, sed poste, strange, la evangeliisto diras "*kelkaj tamen hezitis kredi*", sed pri kio ili hezitas kredi, dubas? Ne ke Jesuo resurektis, ili vidas lin, ne ke li estas en la dia kondiĉo, ili ja adorkliniĝas; kial do ili dubas? La evangeliisto utiligis la verbon "dubi" nur unu alian fojon, en la konata epizodo de Jesuo kiu iras sur la akvo, kio indikas la dian kondiĉon, kaj Petro, lia disĉiplo, volis ankaŭ li iri sur la akvo, tio estas, volis ankaŭ li la dian kondiĉon. Jesuo diras al li, ke li povas iri, sed kiam li ekvidas la malfacilon, Petro komencas droni kaj petas helpon. Li opiniis, ke la dia kondiĉo estos al li havigita kiel donaco dealte, kaj ne sciis, tra kiaj malfacilaĵoj li pasos. Nu, tiufoje Jesuo riproĉis Petron per la vortoj "malgrandfidulo, kial vi dubis?". Do, kia estas ĉi tiu dubo, pri kiu skribas la evangeliisto? Ili vidis Jesuon en la dia kondiĉo, sed nun ili scias, kion trapasis Jesuo: la morton plej misfamigan, plej malŝatatan por judo, la malbenon de la kruco. Pri kio do ili dubas? Ili dubas pri si mem: ili estas invititaj atingi la dian kondiĉon, sed ili ne scias, ĉu ili kapablos alfronti la perserkuton kaj eĉ la morton. Jen kial ili dubas.

Dum la virinoj alproksimiĝis al Jesuo, ĉi tie Jesuo devas alproksimiĝi al la disĉiploj: "*Jesuo alproksimiĝis kaj diris: „Estas donita al Mi ĉia potenco en la ĉielo kaj sur la tero.*", ĉi tie la evangeliisto referencas al profeto Danielo, kie al la filo de la homo estis donita ĉia povo en ĉielo kaj surtere. Tamen Jesuo ne uzas ĉi tiun povon por esti servata, sed, kiel li diros, "la Filo de la homo ne venis por esti servata, sed por servi", do ĝi estas povo de servado.

Kaj jen alvenas la nepra ordono: "*Iru do kaj faru (igu) ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj,*", la termino popoloj indikas la paganajn naciojn, "*baptante ilin*", la verbo bapti signifas mergi, trempi, "*en la nomo*", la nomo indikas la profundan realon de estulo, "*de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito,*", tio estas, mergu ilin en la profundan realon de Dio, spertigu al ili kiu estas Dio, "*kaj instru ilin*", kaj ĝi estas la ununura fojo en kiu, laŭ la evangeliisto, Jesuo rajtigas siajn disĉiplojn instrui, "*observi ĉion, kion Mi ordonis al vi.*", la ununura fojo en kiu aperas la verbo ordoni, en ĉi tiu evangelio, estas ĝuste en rilato kun la feliĉproklamoj.

Kiu do estas la signifo de ĉi tiu ordono de Jesuo? Jesuo estis invitinta siajn disĉiplojn sekvi lin por esti fiŝkaptistoj de homoj: fiŝkapti la homojn signifas ilin eltiri el la akvo, kiu povas havigi al ili la morton, do for el la mortiga situacio, por doni al ili la vivon. Nu, Jesuo nun indikas kiel kaj kie: kiel oni fariĝas fiŝkaptistoj de homoj? Mergante ilin en la Spiriton de la Sinjoro, en la plej profundan realon de la dia amo, kaj kie? Kie la spaco estas la tuta homaro.

Kaj poste, la fina certigo de Jesuo: "*Kaj sciu, ke Mi estos (pli ĝuste: estas) kun vi*", jen la temo, la gvida principo de la tuta evangelio. Je la unua

ĉapitro, versiklo 23-a, la evangeliisto estis indikinta Jesuon kiel "Dion kun ni"; ĉirkaŭ je la mezo de la evangelio Jesuo estis dirinta, ke li estas kun siaj disĉiploj: "kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili"; kaj nun la vortoj de Jesuo konkludas per la certigo pri lia ĉeesto: "*kun vi ĉiam, ĝis*", nu, la nova versio de la Itala Episkopara Konferenco (kaj la teksto de la Esperanta Meslibro) skribas "*la fino de la mondo*", sed estis pli bona la iama itala versio (kaj la teksto en Esperanto de la Londona Biblio), kiu diris "ĝis la maturiĝo de la mondaĝo". Ne temas pri fino de la mondo, sed pri fino de la tempo, kio ne indikas datlimon, sed la kvaliton de ĉeesto; jen do la signifo de la lastaj vortoj de Jesuo: "mi estas meze de vi por ĉiam".

Kaj la evangeliisto, kiu malfermis sian evangelion rilatigante sin al la libro de Genezo (en la greka originalo, la evangelio de Mateo komenciĝas per la esprimo "Libro de genezo de Jesuo Kristo"), ĝin fermas per rilatigo al la lasta libro de la hebrea Biblio, la dua libro de Kronikoj, kie estas la invito de Ciro, reĝo de Persujo, kiu diras al la juda popolo: "La Sinjoro, Dio de la ĉieloj, donis al mi ĉiujn regnojn de la tero, kaj komisiis min konstrui al Li templon en Jerusalemo de Judujo. Ĉiu do el la juda popolo, reiru tiucele kun sia Dio al sia lando.". Ĝi estas la invito de Ciro al la judoj eliri el lia regno por reiri al Izraelo, kaj konstrui al Li templon. Ankaŭ Jesuo invitas siajn disĉiplojn iri, forlasi la religian institucion, tamen ne konstrui templon, ĉar la komunumo de la disĉiploj estos la nova templo, kie manifestiĝas la amo, la mizerikordo de la Sinjoro.